# BULTENO
## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

**N-ro 46 (oka jaro)** **Februaro** **1932**

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al «ESPERANTO» Redaktejo : BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENÈVE

**ENHAVO : La agado de la Internacia Labora Organizajo dum la jaro 1931. — La progresoj de la sociaj asekuroj. — Svedujo ratifas du novajn konvenciojn. — Novaj ratifoj de Aŭstralio kaj Estonujo. — Dua Kunsido de la Internacia Komitato por Interkooperativaj Rilatoj. — Paĝo pri kooperado.**

# La agado de la Internacia Labora Organizaĵo dum la jaro 1931

La vivo de la Internacia Labora Organizaĵo dum 1931 staris sub la influo de la gravaj zorgoj, kiujn la ekonomia krizo kaŭzas en la tuta mondo. Malgraŭ la fakto ke la veraj rimedoj al tiu situacio konsistas en ekonomiaj, financaj kaj politikaj agoj kiuj troviĝas ekster la kompetenteco de la Organizaĵo, ĝi tamen faris sian eblon por plibonigi la situacion, almenaŭ en la kampoj kie ĝia agado povas efektiviĝi. Per konstantaj klopodoj kaj malgraŭ multaj malfacilaĵoj, ĝi fidele plenumis la protektan mision al ĝi fidata de la Packontraktoj.

Ĝi unue permesis, dank'al siaj internaciaj statistikoj, mezuri la disvastiĝon de la senlaboreco en la tuta mondo. Plie, la raportoj prezentitaj de registaraj, mastraj kaj laboristaj reprezentantoj antaŭ la Komisio pri Senlaboreco, la Administra Konsilantaro aŭ la Internacia Labora Konfe renco helpis precizigi la detalajn aspektojn de la problemo en la diversaj landoj, kiel ankaŭ ĝiajn ĝeneralajn aspektojn. Fine, la studoj faritaj de la Oficejo jam servis kiel bazo al praktikaj proponoj.

Tiuj proponoj ĉefe celas kvar punktojn : la neceseco pli bone organizi internacian dungigon de la laboristoj ; la efektiviĝo de grandaj naciaj aŭ internaciaj publikaj laboroj ; la progresigo de la senlaboreca asekuro ; kaj fine la alpreno de internaciaj akordoj pri la labordaŭro.

La demandoj rilataj al la du unuaj punktoj estis studataj ĉe la diversaj organoj de la Internacia Labora Oficejo, poste de la Studa Komisio por Eŭropa Unuiĝo kaj de la Ligo de Nacioj.

Oni decidis kunvoki Konferencon por pli bona organizado de la labordungigo en Europo, al kiu partoprenos administrantoj kaj specialistoj de la diversaj naciaj dungigoficejoj. Tiu Konferenco baldaŭ okazos.

Pri la publikaj laboroj, dektri eŭropaj registaroj jam konigis al la Internacia Laboroficejo interesajn projektojn. Laŭ la unuaj kalkuloj de la specialistoj, la realigo de tiuj laboroj povus doni pli ol 550 milionojn da labortagoj, ne kalkulante la revekigon de diversaj industrioj kiun ĝi kunportus. La afero estas nun en la manoj de la speciala Komitato pri publikaj laboroj kaj naciaj produktiloj, starigata de la Trafika kaj Transita Organizaĵo de la Ligo de Nacioj. La Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo estas reprezentata en tiu komitato, kiu sin turnis jam al la registaroj por demandi al ili precizigi, je teknika, ekonomia kaj financa vidpunktoj, la projektojn jam indikataj, aŭ aliaj novaj projektoj. Oni povas esperi la starigon de kompletaj programoj jam ĉe la komenco de la jaro 1932-a.

Plie, la Administra Konsilantaro de la Internacia Laboroficejo decidis meti la demandon pri asekuro kontraŭ la senlaboreco sur la tagordo de la Internacia Labora Konferenco por 1933.

**Senlaboreco.**

En sia decembra kunsido, la Komisio pri Senlaboreco alprenis diversajn principojn kiuj povus helpi al metoda agado kontraŭ senlaboreco. Ili estas :

Unue la neceseco por ĉiuj Ŝtatoj ratifi kaj rigore apliki la jam ekzistantajn internaciajn konvenciojn pri labordaŭro, precipe la konvencion de la jaro 1919 pri 8-hora labortago en industrio.

Poste la forigo de la pliaj horoj, tiom kiom la praktikaj eblecoj ĝin permesas.

Plie, la mallongigo de la individua labordaŭro por la laboristaro, por permesi la dungigon de pli granda nombro da laboristoj. La decido de la Komisio, al kiu, kiel oni scias, partoprenas reprezentantoj de la registaroj, de la mastroj kaj de la laboristoj, diras ke en la nuna krizo, la plej bona ŝajnas esti labordaŭro de 40 horoj semajne, dispartigitaj, se eble, nur je 5 tagoj.

Fine, oni proponas internaciajn akordojn kiuj enkondukus tiajn solvojn, precipe en la industrioj kie ili estus realigeblaj sen troaj ŝanĝoj.

**Ratifoj de konvencioj**

Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaŭzitaj de la krizo, la ratifo de konvencioj bone progresis dum la jaro 1931-a. Je la 30a de Decembro, la nombro de la ratifoj oficiale registritaj estis 449, kontraŭ 415 la 1-an de Januaro.

Por la unua fojo, oni registrigis dum la jaro ratifojn de Litovujo kaj Liberio. Plie, Albanujo kaj Kolombio, kiuj ĝis nun neniam aplikis la decidojn de la Internacia Labora Konferenco, komencis dum 1931 la procedon por alveni al ratifo de pluraj konvencioj. Kuba Respubliko ratifis ĝis nun 16 konvenciojn, Ĉilo 13. Tio estas citinda rezultato kiu konfirmas la universalecon de la Organizaĵo.

**Dekkvina Kunsido de la Internacia Labora Konferenco.**

Tiu kunsido okazis en Majo-Junio 1931. Ĉar ni raportis pri ĝi sufiĉe detale en antaŭa numero de la « Bulteno » (vidu N.on 43, Aŭgusto 1931), ni ne redonos ĉi-tie la resumon de ĝiaj laboraj. Oni rememoros ke ĝi alprenis novan konvencion, kiu fiksas la subteran labordaŭron en karbominejoj al 7 3/4 horoj potage. Estis la unua fojo kiam internacia laborkonvencio alprenis labortagon malpli longan ol 8 horoj.

**Administra Konsilantaro.**

La Administra Konsilantaro de la Internacia Labora Oficejo sidis kvin foje dum la jaro 1931. Inter la ĉefaj decidoj kiujn ĝi alprenis, ni citos la elekton de la tagordo por la Konferenco de la jaro 1933, la organizon de speciala Mara kunsido de la Internacia Labora Konferenco en 1933, la starigon de Teknika Komisio pri vitrofarejoj. Al tiu komisio partoprenos registaraj, mastraj kaj laboristaj specialistoj ; ĝi devos studi la organizon de semajna ripozo en vitrofarejoj.

**Sciencaj laboroj.**

Krom siaj regulaj publikaĵoj, la Internacia Laboroficejo publikis dum la jaro 1931 multajn sciencajn studojn. Pluraj en ili celas helpi la eltrovon de la kaŭzoj de la nuna krizo kaj de la eblaj rimedoj. Aliaj temas pri diversaj laboraj kaj sociaj demandoj, kiel ekzemple la serio da monografioj pri « industriaj rilatoj » (rilatoj inter mastroj kaj laboristoj en la entreprenoj), studioj pri loĝejpolitiko en Europo, pri la principoj kaj metodoj por fiksado de salajroj en karbominejoj, pri la salajroj kaj reguligo de laborkondiĉoj en Soveta Ruslando, ktpl.

Ĵus eliris el presejo la studo demandita de la aŭtomobilfabriko Ford pri « vivkosto en sia raporto kun salajro », en diversaj eŭropaj industriaj urboj, kompare al simila urbo en U.S.A. (Detroit).

Al multaj aliaj studoj oni daŭrigis labori en 1931. Tiuj studoj traktas pri la plej diversaj temoj : laborkondiĉoj, industria higieno, antaŭforigo de labor-akcidentoj, sociaj aspektoj de la raciigo en industrio, sociaj asekuroj, dungigo kaj migrado de la laboristoj, agrikultura laboro, navigado, intelektaj laboristoj, laborkondiĉoj de la indiĝenoj, vivkondiĉoj de la laboristoj, kooperado, akordigo kaj arbitracio, ktpl.

## La progresoj de la sociaj asekuroj

La Internacia Laboroficejo antaŭ nelonge sendis al ĉiuj registaroj de la Ŝtatoj-membroj de la Organizaĵo antaŭraporton pri la asekuro kontraŭ invalideco, maljuneco kaj morto. La proksima Internacia Labora Konferenco, kiu okazos en Aprilo 1932 en Genève, okupiĝos pri tiu demando.

Oni scias ke la Konferenco jam alprenis plurajn decidojn pri sociaj asekuroj : konvencioj de 1921 kaj 1925 pri la kompenso pro laborakcidentoj kaj pro profesiaj malsanoj, konvencioj de 1927 pri asekuro kontraŭ malsano de la laboristoj en industrio kaj komerco, kaj de la agrikulturaj laboristoj. Por kompletigi tiun tuton, ĝi devas ankoraŭ starigi internacian reguligon de la asekuro kontraŭ invalideco, maljuneco kaj morto.

La raporto de la Internacia Laboroficejo montras ke tia asekuro, en sia kaj deviga formo, jam ludas gravan rolon en multaj landoj.

La unua lando kiu enkondukis devigan kaj ĝeneralan asekuron pri invalideco-maljuneco estas Germanujo, kie tio okazis en 1889. Tiu ekzemplo restis nura ĝis kiam Aŭstrio ĝin sekvis, en la jaro 1906, per enkonduko de asekuro-pensio de parto de la laboristoj (tiuj kiuj ne estis manlaboristoj). La franca leĝo de 1910 pri la laboristaj kaj kamparaj pensioj ne estis aplikita.

En 1911, Germanujo kompletis sian sistemon de la jaro 1889 kaj enkondukis asekuron de la postvivantoj kaj asekuron de la oficistoj. Ĉe la sama epoko estis alprenitaj la brita sistemo de invalideco-malsano asekuro, la luksemburgaj kaj rumanaj invalideco-maljuneco asekuroj, kaj la sveda nacia asekuro.

Post la milito, Nederlando aplikis sian leĝon de la jaro 1913, Hispanujo kaj Italujo alprenis devigan asekuron. Aliaj landoj sekvis : Belgujo, Bulgarujo, Ĉilo, Ĉeĥoslovakujo en 1924, Granda Britujo kun sia maljuneco kaj postvivantojasekuroj en 1925 kaj 1926, Polujo kun sia asekuro de la intelektaj laboristoj en 1927.

La tutlastaj jaroj alportis novajn progresojn, malgraŭ la ekonomiaj malfacilaĵoj. Oni povas citi, ekzemple : en Hungarujo, komence de 1929, la ekfunkciado de la asekuro kontraŭ invalideco, maljuneco kaj morto por la industriaj kaj komercaj salajruloj ; en Francujo, la ekaplikado, en julio 1930, de la ĝenerala leĝo pri sociaj asekuroj ; en Belgujo, la reordigo, dum la sama jaro, de la leĝaro pri maljuneco kaj morto-asekuro de la laboristoj kaj oficistoj, kaj la voĉdono favora al la leĝo pri maljuneco-postvivantojasekuro per la svisa parlamento.

Entute, la Internacia Laboroficejo povis analizi en sia studo ĉirkaŭ kvindek asekuro-reĝimojn, sen ke la multnombraj specialaj reĝimoj aplikeblaj al la fervojistoj, al la maristoj, al la ŝtatoficistoj estu enkalkulitaj. Tiuj reĝimoj estas kutime pli favoraj ol la leĝaroj aplikeblaj al la aliaj kategorioj de salajruloj. Tiuj diversaj leĝaroj, kiuj aplikiĝas al pluraj dekmilionoj da laboristoj, representas bazon tre taŭgan por la ellaboro de internacia reguligo. Kvankam tre diversaj, la naciaj solvoj permesas ekstrakti el ili fundamentajn principojn kiuj povas esti alprenitaj en unu aŭ pluraj konvencioprojektoj kaj en rekomendoj de la Konferenco.

Unu el tiuj principoj estas tiu de la deviga asekuro por ĉiuj salajrataj laboristoj. Ĝi estas akceptita en la plimulto de la industriaj landoj kiuj alprenis leĝojn pri asekuro, kaj la Internacia Laboroficejo ĝin enskribis komence de la projekto kiun ĝi prezentos al la proksima Konferenco.

## Svedujo ratifas du novajn konvenciojn

La Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj registrigis, la 22-an de decembro 1931, la ratifon per la reĝa sveda registaro de la konvencio pri aplikado de la semajna ripozo en industriaj entreprenoj (alprenita dum la tria kunsido de la Internacia Laborkonferenco, en 1921) kaj de la konvencio pri forigo de deviga kaj perforta laboro (alprenita dum la dekkvara kunsido, en 1930). Svedujo ratifigis ĝis nun entute 15 konvenciojn de la Internacia Labora Organizaĵo.

## Dua Kunsido de la Internacia Komitato por Interkooperativaj Rilatoj

Ni jam konigis, en N° 42 de nia Bulteno, la starigon de Internacia Komitato por Interkooperativaj Rilatoj.

Tiu-ĉi Komitato havis sian duan kunsidon antaŭ nelonge en Ĝenevo, en la salonoj de la Internacia Labora Oficejo kaj sub la Prezidanteco de S-ro Albert Thomas, Direktoro de la Oficejo.

La Komitato daŭrigis sian studon de la jam realigitaj au projektitaj organizo-formoj kiuj povus reguligi la vendon de la agrikulturaj produktoj per forigo de malŝparego, disperdo de valoroj kaj tro grandaj prezovariadoj. Ĝi okupiĝis precipe pri la problemoj rilataj al tritiko, faruno, pano kaj ovo-vendo. Inter la jam realigitaj organizo-formoj, ĝi elektis kiel speciale tipa kaj modela tiun kiun starigis en 1921, la Komuna Agentejo de la Pogranda Magazeno de la anglaj konsumaj kooperativoj kaj de la Asocio de Novzelandaj laktejoj, celante la rektan vendon de novzelandaj laktoproduktoj al la britaj konsumantoj.

## Novaj ratifoj de Aŭstralio kaj Estonujo

Aŭstralio ratifis la konvencion pri deviga kaj perforta laboro; la Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj registrigis tiun ratifikon la 2an de januaro 1932.

La aŭstralia registaro ankaŭ informis la Ĝeneralan Sekretarion de la Ligo de Nacioj ke ĝi akceptas la rekomendojn de la Internacia Laborkonferenco pri malrekta devigo al laboro kaj reguligo de la deviga au perforta laboro, alprenitaj dum la Konferenco de la jaro 1930, kaj intencas ilin apliki en sia lando.

Plie, la Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Nacioj registrigis, la 18an de Januaro 1932, la ratifon, per la registaro de la Estona Respubliko, de la Konvencio pri sciigo de la pezo de multpezaj pakaĵoj transportataj surŝipe (Konvencio alprenita dum la dudeka kunsido de la Internacia Laborkonferenco, Genève 1929). Vidu cetere la ĉi-suban tabelon.

## LISTO DE LA KONVENCIOJ ĜIS NUN ALPRENITAJ KAJ DE LA ŜTATOJ KIUJ RATIFIS ILIN

**(FINO, vidu la antaŭan numeron)**

| Kunsidoj | Konvencioj pri: | Ŝtatoj ratifintaj | Nombro |
|---|---|---|---|
| 1925 | 20. Egaleco de traktado por naciaj kaj eksterlandaj laboristoj pri kompenspago por akcidentoj. | Aŭstrujo, Belgujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Ĉilo, Danlando, Estonujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Granda-Britujo, Hindujo, Hispanujo, Hungarujo, Irlando, Italujo, Japanlando, Jugoslavujo, Kubo, Latvolando, Luksemburgo, Nederlando, Norvegujo, Pollando, Portugalujo, Svedujo, Sudafriko, Svislando | 28 |
| 1925 | 21. Nokta laboro en bakejoj. | Bulgarujo, Estonujo, Finnlando, Kubo, Luksemburgo | 5 |
| 1926 | 22. Simpligo de inspekto de elmigrantoj surŝipe. | Aŭstralujo, Aŭstrujo, Belgujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Finnlando, Granda-Britujo[1], Hindujo, Hungarujo, Irlando, Japanlando, Luksemburgo, Nederlando, Svedujo[1] | 14 |
| 1926 | 23. Dungokontraktoj de maristoj. | Belgujo, Bulgarujo, Estonujo, Francujo, Germanujo, Granda-Britujo, Hispanujo, Irlandujo, Italujo, Jugoslavujo, Kubo, Luksemburgo, Polujo | 13 |
| 1926 | 24. Reenpatrujigo de maristoj. | Belgujo, Bulgarujo, Estonujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Irlandujo, Italujo, Jugoslavujo, Kubo, Luksemburgo, Pollando | 12 |
| 1927 | 25. Asekuro kontraŭ malsano por laboristoj en industrio kaj komerco kaj domservistoj. | Aŭstrujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Ĉilo, Germanujo, Granda-Britujo, Hungarujo, Jugoslavujo, Latvolando, Litovujo, Luksemburgo, Rumanujo | 12 |
| 1927 | 26. Asekuro kontraŭ malsano por agrikulturaj laboristoj. | Aŭstrujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Ĉilo, Germanujo, Granda-Britujo, Luksemburgo | 7 |
| 1928 | 27. Kreado de metodoj por fiksi minimumajn salajrojn. | Aŭstralujo, Ĉinlando, Francujo, Germanujo, Granda-Britujo, Hispanujo, Irlando, Italujo | 8 |
| 1929 | 28. Sciigo de la pezo de multpezaj pakaĵoj transportataj surŝipe | Aŭstralujo, Ĉinlando, Hindujo, Irlando, Japanlando, Luksemburgo, Estonujo | 7 |
| 1929 | 29. Protekto kontraŭ akcidentoj de laboristoj okupataj pri la ŝarĝado kaj deŝarĝado de ŝipoj. | Irlandujo, Luksemburgo | 2 |
| 1930 | 30. Forigo de deviga kaj perforta laboro. | Granda-Britujo, Irlando, Liberio, Aŭstralio, Svedujo | 5 |
| 1930 | 31. Limigo de laborhoroj en komerco kaj oficejoj al 48 semajne. | | |
| 1931 | 32. Limigo de laborhoroj de karbministoj al $7^3/_4$ tage, eniro kaj eliro enkalkulataj. | | |

# PAĜO PRI KOOPERADO

## La Kooperado sub la Tropikoj

Sub la aŭspicoj de la franca nacia Federacio de Konsumaj Kooperativoj, S-ro Maurice Colombain, membro de la Kooperativa Servo ĉe la Internacia Labora Oficejo, publikigis tre interesan franclingvan broŝuron kun la ĉi-supra titolo.

Per sia studo, la aŭtoro celis klarigi la rolon kiun jam ludas aŭ povas ludi en la kolonioj la kooperado kiel formo de ekonomia organizo kaj ilo de socia edukado. Li precipe studis la landojn kie loĝas ĉefe la rasoj tiel nomataj « primitivaj », kaj antaŭ ĉio la subtropikajn landojn.

Antaŭ duonjarcento apenaŭ, oni ankoraŭ konsideris tiujn popolojn kiel sovaĝaj, kaj havis por ili nur iom malestiman kompaton. Hodiaŭ oni devas konstati ke la kooperado tre bone sukcesas ĉe tiuj malriĉaj kaj malkleraj popoloj, ofte sklavoj de malnovaj kutimoj aŭ religiaj superstiĉoj. Nek la manko de instruado, nek la malriĉeco, nek la religiaj kredoj serioze malhelpis la disvolviĝon de la kooperado ĉe ili. Miloj da hindaj kooperativoj konsistas nur el nekleraj viroj kaj virinoj; ili tamen prosperas. Estas inter la pli malriĉaj homoj ke la kredit-kooperativoj plejbone sukcesas. La kooperado, sub ĉiuj formoj, do adaptiĝas same bone al la bezonoj de la mahometanoj, de la hindanoj, de la buddistoj, ktpl., kiel al tiuj de la kristanoj.

En Australio, en Kanado, en Novzelando kaj en Sudafriko, estas la kooperativaj institucioj kiuj vendas la plimulton el la terproduktoj; la kreditkooperativoj ankaŭ bone sukcesas tie, same kiel la kooperativoj kiuj havigas al siaj membroj agrikulturan materialon. Sed la kooperativa movado en tiuj landoj, jam de longe kolonigitaj, estas nur, kiel diras S-ro Colombain, « plilongigo de la eŭropa kooperativa movado ».

Ĉu la kooperado povas stariĝi kaj ludi rolon en la tropikaj landoj, kie la klimataj, ekonomiaj kaj sociaj kondiĉoj estas aliaj ol en Europo, kaj kie la influo de la europaj ideoj estas nur nerekta au relative malforta ? Tion sin demandis la aŭtoro, kaj post studo de la afero li respondas jese. « Kion la Blankuloj faris en kooperativa kampo, tion la Nigruloj, la Flavuloj kaj la Ruĝuloj ankaŭ povas lerni fari », li diras.

Por pruvi sian diron, la aŭtoro de la broŝuro citas grandan nombron da faktoj, elĉerpitaj el diversaj dokumentoj, ĉefe oficialaj.

Estas maleble doni ĉiujn tiujn provojn ĉi-tie. Ni nur povas eltiri unu aŭ du el la multaj kiuj troviĝas en la broŝuro.

Brita Hindujo nun havas 100.000 kooperativojn, kun kvar milionoj da membroj. Tio estas rezultato atingita en daŭro de dudekkvin jaroj ĉe la klaso de la malgrandaj produktistoj, kiuj tiamaniere estas protektataj kontraŭ ekspluatado kaj povis plibonigi sian agrikulturan teknikon.

En la Filipinaj Insuloj, la nombro de la kooperativistoj atingis 90.000 en malpli ol dekkvin jaroj.

En brita Malaja Azio, oni komisiis registaran komitaton studi la eblecon starigi kooperativajn instituciojn. La Komitato unuanime respondis ke tiaj kooperativoj tute ne sukcesus. Sep jarojn poste, en 1929, la Malajaj Ŝtatoj kalkulis 206 kooperativajn societojn ! Tiuj societoj, plej parte kreditkooperativoj, kunigas pli ol 32.000 membroj kaj kapitaloj de 2.750.000 dolaroj.

La kooperado kompreneble ne progresas tiel rapide en ĉiuj tropikaj landoj. En Afriko, ekzemple, la kooperativoj ankoraŭ nur komencetas, almenaŭ en la landoj antaŭ nelonge ekkolonigitaj. Tiam ili kutime celas la preparadon aŭ vendadon de lokaj produktoj (palmoleo, kakao, kafo) kaj la plibonigon de la terlaborigiloj. Oni tamen ofte konstatas plenan sukceson de la nove starigitaj nigrulaj kooperativoj, precipe en Taganyika kaj Kenia.

---

## Starigo de kooperativa hospitalo en Bulgarujo

Grupo da kuracistoj, kooperativistoj kaj aliaj interesuloj fondis en Burgas (haveno ĉe la Nigra Maro) kooperativan societon kies ĉefa celo estas la starigo de hospitalo sur kooperativa bazo. La nova societo ankaŭ celas helpi al la disvastigado de higienaj kaj profilaktikaj principoj ĝenerale.

La hospitala kooperativo kunigas la necesajn kapitalojn per subskribo de akcioj po 100 levoj por individuaj membroj kaj 1000 levoj por kolektivaj membroj. Povas fariĝi kolektivaj membroj ĉiuspecaj institucioj, kiel departamentoj, komunumoj, popolaj bibliotekoj, lernejoj, religiaj, bonfaraj kaj similaj institucioj, kreditorganizaĵoj, k.t.pl. La hospitalo pagigos siajn servojn kaj povos ricevi ankaŭ donacojn, pruntojn kaj deponojn.

La ĝenerala kunsido de la membroj elektas administran Konsilantaron kun 9 membroj, nomas la ĉef-kuraciston kaj la personaro de la hospitalo, laŭ propono de la ĉefkuracisto.

La profitojn oni disdonos laŭ sekvanta maniero : 25% al la rezervoj, 10% por sociaj celoj, 40% por pligrandigo de la hospitalo, 10% por renovigo de la meblaro kaj ilaro, 10% por helpo al malriĉaj malsanuloj, kaj 5% al la asekurokaso de la personaro.

La hospitalo estos malfermata ne nur al la membroj, kiuj cetere ĝuos plifavorajn prezojn ol la aliaj personoj, sed ankaŭ al la membroj de ĉiuspecaj kooperativoj kaj al la ĝenerala publiko.

La fondo de tia hospitalo kunportas utilojn por la malsanuloj kiel por la kuracistoj kaj la partoprenantaj institucioj.

La malsanuloj profitos je ĝustaj kondiĉoj, partopreno de siaj profesiaj aŭ kooperativaj organizaĵoj je la kostoj de sia enhospitaligo, libera elekto de sia kuracisto aŭ kunlaborado de ĉi-tiu lasta kun la kuracistoj de la hospitalo ; ili ankaŭ havos la eblecon eviti la privatajn hospitalojn, ofte tro karajn, kaj trovi en la nova entrepreno institucion de publika utileco, sen ke ĝi estu ŝtata hospitalo.

La kuracistoj povos ekzerci sian profesion en la hospitalo sen bezono de propraj kostegaj instalaĵoj ; ili plie trovos en la hospitalo la klinikajn kondiĉojn necesajn al iliaj sciencaj studoj.

Fine, por la institucioj (kooperativoj, kasoj por sociaj asekuroj, bonfaraj societoj, ktpl.) la kooperativa hospitalo estos propra entrepreno kiu savos iliajn interesojn same kiel la interesojn de iliaj membroj.

L'IMPRIMEUR-GÉRANT : A. GRANCHAMP, 2, RUE DES USINES, ANNEMASSE -64-2-32

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL